Uzante la vaporforman akvon, ĝi ebligas elektro-produktadon pere de turbino. La tutmonda potencialo estas granda, ĉefe en ĉiuj ĉirkaŭ-Pacifikaj landoj (fajro-zono).

Tiel, ĉirkaŭ la jaro 2010, la potenco estos 2978 MWé en Usono, 1170 MWé en Meksikio, 500 MWé en Nikaragvo kaj Ekvadoro, 3100 MWé en Japanio.

Filipinoj, je 2900 MWé, kaj Indonezio, je 2360 MWé instalitaj, estas nuntempe la ĉefaj. Francio disponas je altenergi-aj geotermiaj resursoj nur en la transmaraj departementoj kaj teritorioj. Nuntempe, nur en Gvadelupo la geotermia centralo de Bouillante (Basse-Terre) produktas 3,5 Mwé.


Malaltenergia geotermio

Estas la videble plej interesa por ni, pro tio, ke ĝi ebligas produkti varmon por hejtado kaj produktigi varman akvon de urbaj varmoretoj, samtempe luktante kontraŭ la forcejefekto.

Ĝi uzas la varmajn akvojn entenatajn en la grandaj sedimentaj basenoj (Pariza kaj Akvitana Basenoj, Limagne, ktp) kaptitajn de profunda boraĵo.

Tiel, en Parizio, troveblas akvoj ĉirkaŭ 75°C je 2000 m de profundo, kio ebligas hejti preskaŭ 200000 loĝejojn aŭ similajn ejojn (publikaj konstruaĵoj, banejoj, ktp) en Chevilly Larue, l'Hay les Roses, Meaux, Coulommiers, Fresnes, Alfortville, ktp.

Geotermio



Tre malaltenergia geotermio

Nuntempe kreskeganta ĉe niaj svisa kaj germana najbarlandoj, ĝi signifas uzadon, pere de varmec-pumpilo, de la kalorioj entenataj en la tre malprofundaj terniveletoj (malpli ol 200 m averaĝe), aŭ pere de subtera akvo, kiam tiu ĉeestas, aŭ dank'al « geotermiaj sondiloj », specoj de tubecaj intersanĝiloj enfiksatajn en ne akvokaptanta boraĵo.

*proponis Méline, tradukis Aleks Kadar
fonto : <http://comm.energie.lesverts.fr>*



Ĝenanta vero (An Inconvenient Truth)

Ĉiuj memoras Al Gore, ĉu ne? Retroeniru... Ni estas en la jaro 2000, la vicprezidento de Usono, Al Gore, perdas la baloton kontraŭ Georges Bush. Kaj de tiam, li iĝis heroldo de ekologio kaj partoprenis en filmo, pri kiu tiu artikolo temas. Pro poluigantaj agadoj, ĉefe industriaj kaj transporta, la kvanto de karbona dioksido danĝere kreskas en nia atmosfero. La unua konsekvenco de tiu poluado estas la varmigo de nia klimato. Tio kaŭzas la degelado de la polusaj glaĉeroj.

Tiu fenomeno ebligas al la ultraviolaj radiadoj eniri en la marojn kaj plu varmigi ilin, tiel la degelado plirapidigas. La klimato plene transformiĝas kaj la konsekvencoj estas katastrofaj

Ĉiu-jare, ni povas spekti novajn naturajn katastrofojn pro la misagordiĝo de la klimato. La uraganoj, la kirloventegoj kaj la tropikalaj ŝtormoj ĉiam estas pli fortaj kaj multnombraj, tiel Katerina detruis la regionon de Nov-orleano kaj Antiloj en 2005,



Kial Esperanto-renkontiĝoj...

La titolo-demando povas aspekti stranga al ni, esperantistoj, kiuj ĉiam strebas al la bonfarto de niaj samplanedanoj. Sed la mondo ŝanĝiĝis post la apero de la Unua Libro, kaj tial ankaŭ la danĝeroj. Ekzemple unu el la plej gravaj minacoj de la sekvontaj jardekoj, laŭ la opinioj de multaj, estas la tuttera plivarmiĝo.

Unuaŝtupe eble indas memorfiksi kelkajn nombrojn pri tiu fenomeno¹.

La tutteran plivarmiĝon estigas plifortigo de la forceja efiko, kiu estas ia kaptilo por parto de la varmo radianta de la suno. Kaŭzas tiun plifortigon la eligo far la homaro de pli kaj pli da tiel nomataj forcejefikaj gasoj (ĉefe CO₂ sed ankaŭ metano kaj aliaj).

1 Tiuj nombroj estis prenitaj el la verkoj de J-M. Jancovici. Multaj el ili estas legeblaj en lia retpaĝo, www.manicore.com (en la franca)

La homaro nuntempe eligas ĉirkaŭ 6 gigatunojn da karbon-ekvivalento² en la atmosferon ĉiujare, dum la naturaj putoj (ĉefe la kreskaĵoj kaj la oceanoj) kapablas ensorbi nur 3 gigatunojn.

Do, se ni vere volas kontraŭbatali la tutteran plivarmiĝon, la unua ŝtupo estu malaltigi niajn eligojn ĝis tiu nivelo de 3 Gt. Kaj ni nun estas 6 miliardoj sur la Tero. Facila matematika gvidas al la konkludo, ke ĉiu homo « rajtas » eligi po 500 kg da karbonekvivalento jare.

Tio estas eĉ plej minimuma ŝtupo, ĉar la plivarmiĝo jam sentblas, kaj tial la putoj fariĝas malpli efikaj: dum varmegaj someroj, la kreskaĵoj fakte eligas pli da CO₂ ol ili enigis, kaj la pli

2 « karbonekvivalento » estas la unuo, kiu ebligas kompari kaj mezuri la efikojn de la diversaj forcejefikaj gasoj

varmaj oceanoj kapablas solvi malpli da CO₂. Plie, kompreneble, la tera loĝantaro pligrandiĝas konstante, tial la divido per 6 miliardoj validas nur hodiaŭ.

Kial do Esperanto-renkontiĝoj estas tiuskope danĝeraj?

Do, revenante al nia titolo-demando, kial do Esperanto-renkontiĝoj estas tiuskope danĝeraj? Sufiĉas legi kelkajn dissendolistojn por vidi ke, monatojn antaŭ ĉiu grava kongreso, interŝanĝiĝas informoj pri la plej oportunaj kaj malmultekostaj rimedoj por ĝin atingi; kaj inter tiuj informoj plej ofte temas pri aviadbiletoj. Eĉ en la junulara medio, kie antaŭ kelkaj jaroj la reflekso estis aĉeti Inter-rail Karton, oni nun tuj



Ĝenanta vero (sekvo)

la oftaj senakvigadoj transformis la afrikajn pejzaĝojn kiel la Ĉada lago. La konsekvencoj estas ne nur klimataj, la plialtigo de la maroj forigos landojn, ĉefe malgrandegajn ŝtatojn el suda Pacifiko kiel Tuvalo. Tio ankaŭ minacas landojn kun multnombraj loĝantoj kiel Bangladeŝo kaj Nederlando. Tiuj eventoj kreos t.n. klimatajn rifuĝintojn kaj kaŭzos gravajn migradojn de popoloj kiuj ne plu havos landon, pro la kulpo de okcidentaj socioj. La landoj dissendante la plej grandan kvanton de forcejefikaj gasoj estas la riĉaj landoj (Usono, eŭropaj landoj, Kanado...). Tiel,

dum la filmo, ciferoj videblas por pruvi la danĝerecon de nia vivmaniero.

Bedaŭrinde, malmultaj solvoj estas proponitaj, krom aĉeti ŝpareman veturilon kaj malsalti televidilon kiam oni ne rigardas ĝin. Tiuj konsiloj ridigas ĉefe kiam la parolisto videblas, dum la tuta filmo, vojaĝante per aviadilo aŭ per grandaj aŭtoj. Fakte, tiu dokumento priskribas la vivon de Al Gore. Tiel ni eksciis, ke li interesiĝas pri ekologio de pluraj jaroj, kiam li renkontis iun universitatan profesoron. Poste, ni malkovras lian profesian vojon,

kaj lian trairon de la dezerto de la prezidenta baloto en 2000

Spektinte tiun filmon, ni ja povas nin demandi, kial li ne agis kiam li estis vicprezidento inter 1993 kaj 2001. Ekde 1992, la alarmo sonigis kadre de la kongreso en Rio pri la estonteco de nia planedo.

Ĉu tiu dokumento ne havas kiel celo, relanĉi lian politikan karieron kaj prepari lian venontan kandidatiĝo por la usona prezidenta baloto?

Olivier D.

estas danĝeraj por la homaro...

turniĝas al ĉipaj flugkompanioj eĉ por eneŭropa vojaĝo. Sed problemego estas, ke per nur unu aleksterlanda flugo, oni kutime jam superas la 500 kilogramojn kalkulitajn ĉi-supre.

Konsideru francan esperantiston, kiu planas ĉeesti la UKn en Japanio...

Ekzemple konsideru ni francan esperantiston, kiu planas ĉeesti la UKn en Japanio. La flugo Parizo-Tokio en turista klaso kaŭzas la eligon de 1160 kg da karbonekvivalento en la atmosferon (tio estas averaĝa persona kvanto por plena aviadilo), do jam pli ol duoblo de la jara permesita kvanto.

Sekve, eĉ se tiu bonkora esperantisto dum la jaro ĉiam veturas per bicikle, manĝas vegetarane kaj hejtas sian hejmon per renoviĝeblaj energioj (trafiko, bredado kaj hejtado estas tre gravaj fontoj de forcejefikaj gasoj), ĝi tamen forte kunlaboras por plivarmi la teron. Aliperspektive, oni eĉ povas diri ke ŝli ŝtelas la 500 kg da karbonekvivalento, kiun iu Afrikano (aŭ alia

Sudulo) rajtus uzi por plibonigi siajn vivkondiĉojn... kiuj eĉ plimalboniĝos dum la sekvaj jaroj pro la tutmonda plivarmiĝo.

Ĉu estas solvoj?

En lia filmo pri tuttera plivarmiĝo, oni vidas Al Gore prezenti dum prelegoj ĉiujn danĝerojn kaŭzigitajn de tiu fenomeno kaj poste salti en aviadilon, kie li ripozas en sia unuaklasa seĝo. Poste li klarigas, ke li kompensas ĉiujn siajn flugojn per mono donata al unu el tiucele kreitaj agentejoj. Ili finansas projektojn en malriĉaj landoj por tie malpliigi la eligon de forcejefikaj gasoj, pere de mono libervole donita de vojaĝantoj kaj bareme kalkulita laŭ la eligitaj gasoj de iliaj flugoj.

Tiu sistemo povas aspekti alloga, sed oni devas konscii, ke la donita mono tute ne utilas por elpreni la gasojn el la atmosfero, ĉar tio teknike ne eblas. Kaj ankaŭ ke, je la fino, oni devos helpi la malriĉajn landojn malpliigi iliajn eligon, nedepende, ĉu oni flugas aŭ ne!

Kio restas do por esti bona klimatkonscia esperantisto kaj akordigi sian alkongresan vojaĝemon kaj sian deziron ne tro kontribui al tuttera plivarmiĝo?


Por vojaĝoj ene de Eŭropo restas kompreneble trajnoj kaj ŝipoj³. Oni ja bezonas iom pli da tempo kaj ofte pli da mono, sed tiam la vojaĝo iel fariĝas antaŭkaj post-kongreso: oni povas halti en aliaj urboj laŭvoje kaj tie viziti esperantistojn, pere de Pasporta Servo ekzemple.

Por vojaĝoj al foraj kontinentoj, kompreneble, la afero estas pli malfacila. Tamen, en la retpaĝo menciita en la piednoto, vi trovos klarigojn kiel atingi trajne kaj ŝipe Hanojon kaj Jokohamon – kie okazos IJK kaj UK en 2007 – dum nur 2 semajnoj.

Por la multaj studentoj kaj pensiuloj inter la kongresantoj, tio ja estas tute akceptebla daŭro, ĉu ne?

Emmanuel Villalta

3 la referenca retpaĝo por vojaĝoj sen aviadilo estas www.seat61.com (en la angla)



Kvanto da forcejefikaj gasoj eligitaj per kelkaj flugvojaĝoj, en kilogramoj da karbonekvivalento



Pri mas-stovoj

Mas-stovo estas perligna hejtilo simila al stovo aŭ kameno. La ĉefa diferenco inter mas-stovo kaj kameno estas ĝia ekstera aspekto kaj la materialoj uzitaj por konstrui ĝin.

Kio estas mas-stovo?

Mas-stovoj estas ĝenerale konstruitaj el masonaĵo aŭ vulkana ŝtono, materialoj kapablaj konservi kaj elradii la varmon. Tradicie, la konstrua tekniko dependas de la regiono: oni trovas fajencajn mas-stovojn en Alzaco, Germanio, Aŭstrio kaj Svislando; en Rusio mas-stovoj el masonaĵo estas ĝenerale parto de la muroj de la domoj, en rusaj stovoj la kompleksforma fumkondukilo ebligas eltiri pli da varmo el la fumo; en skandinaviaj landoj troveblas mas-stovoj el steatito (vulkana ŝtono ankaŭ nomita sapŝtono).

Elradia varmo

Ju pli peza la stovo estas, des pli da termika energio ĝi povas konservi: por hejti domon grandan je cent kvadrataj metroj oni kalkulas, ke la necesa maso da steatito estas proksimume du tunoj! Tiu maso ebligas hejti tutan domon kun konstanta temperaturo, farante fajron po tri horoj tage.

Se vi havas elektrajn radiatorojn en via loĝejo, vi probable spertas la fenomenon nomitan «konvekto». Konvekta radiatoro funkcias varmigante la aeron



foto : <http://mha-net.org/>

ĉirkaŭ ĝi. Pro fizikaj kialoj la varmigita aero altiĝas al la plafono: malvarma aero anstataŭas ĝin kaj estas varmigata siavice. Tiun sistemon oni ofte taksas malkomforta:

- oni sentas varmecon nur ĉar la aero estas varma ĉirkaŭ oni; la radiatoro ne rekte hejtas la internajn partojn de onia korpo;
- la temperaturo ne estas homogena; oni ofte sentas malvarmon ĉe la planko.

Kun mas-stovo okazas preskaŭ neniam da konvekto: la termika energio konservita en la masonaĵo transiĝas ne per la aero, sed per termika radiado. Tio signifas, ke mas-stovo rekte varmigas ĉiujn objektojn, kiujn la radioj atingas. Ĉar tiaj radioj povas parte trairi materialojn, oni spertas varmecon eĉ interne de sia korpo. Plie ankaŭ la muroj de la domo varmiĝas: se ili estas el taŭga materialo, ankaŭ ili povas kapti kaj elradii varmon. La rezulto estas sento de konstanta kaj homogena varmecon, proksima al la varmecon de la suno.

Tiuj estas retpaĝoj en la franca, kiuj temas pri mas-stovoj:

http://fr.ekopedia.org/Poêle_de_masse : artikolo pri mas-stovoj en Ekopedia (libera ekologiista enciklopedio).

<http://forums.futura-sciences.com/thread42362.html> : longega diskuto en reta forumo pri spertado de mas-stovoj. Tiu diskuto komenciĝis en aŭgusto 2005 kaj plu daŭras.

<http://www.tulikivi.fr/> : Tulikivi (finna kompanio, kiu konstruas mas-stovojn el steatito)

<http://www.poele.com/> : Hiemstra (franca kompanio, kiu konstruas mas-stovojn el masonaĵo)

Ekologia kaj ŝpariga

En tradiciaj kamenoj oni uzas malmolan lignon, kiu brulas malrapide (ligno el kverko, fago aŭ frakseno) : tiel la fajro ne estos tro varma kaj daŭros sufiĉe longe. La malavantaĝo de tiu sistemo estas, ke la brulado de la ligno estas nekompleta kaj polua. Oni devas uzi grandajn kvantojn da multekosta ligno kaj ofte la kameno ne sufiĉas por hejti tutan domon.

Male, en mas-stovo oni uzas molan lignon, kiu brulas rapide (ligno el pino, poplo aŭ saliko) : la temperaturo en la fajrejo altigas rapide, sed la maso de la stovo konservas la termikan energion kaj elradias ĝin malrapide. Pro tiu rapida brulado, la ligno brulas preskaŭ komplete: restas nur eta kvanto da cindro kaj fulgo en la stovo kaj en la kamentubo. Plie, molaj lignoj estas ĝenerale malpli kostaj ol malmolaj lignoj.


betonŝtono	<i>parpaing</i>
cindro	<i>endre</i>
elradii	<i>rayonner</i>
fago	<i>hêtre</i>
fajrejo	<i>foyer</i>
frakseno	<i>frêne</i>
fulgo	<i>suie</i>
gipso	<i>plâtre</i>
hejti	<i>chauffer (un local)</i>
kameno	<i>cheminée</i>
kamentubo	<i>conduit de cheminée</i>
kverko	<i>chêne</i>
ligno	<i>bois</i>
maso	<i>masse</i>
masonaĵo	<i>maçonnerie</i>
mas-stovo	<i>poêle de masse</i>
materialo	<i>matériau</i>
pino	<i>pin</i>
poplo	<i>peuplier</i>
renoviĝiva	<i>renouvelable</i>
saliko	<i>saule</i>
stovo	<i>poêle (chauffage)</i>

Kelkaj malavantaĝoj

Mas-stovoj ŝajnas esti idealaj hejtiloj: ili estas komfortaj, nepoluaj, ili uzas malmultekostan lignon... sed ankaŭ ili havas malavantaĝojn:


- Konstrui mas-stovon povas esti multekosta: la stovo sole povas kosti je 6000 eŭroj. En francio la imposta servo redonos al vi duonon de tiu sumo pro la registara subteno de renovigeblaj energioj.
- Mas-stovo povas esti tro peza por la planko de via domo.
- Mas-stovo funkcios des pli bone, se via domo estas konstruita el materialoj kapablaj konservi la varmon. Preferu domon el briko aŭ ligno ; evitu betonŝtonojn kaj gipson.
- Stovoj el steatito estas pli facile troveblaj komerce, sed eble ilian grizan koloron vi ne tiom ŝatos. Bedaŭrinde ĝi ne estas ŝanĝebla

Guillaume Savaton



ATTENTION,
LES GARS,
ÇA VA CHAUFFER !





Nuklea energio: estonteca energio

10 10 2006 - Flamanville 3 : la preparlaboroj ekas

La 10-an de oktobro, Pierre Gadonneix (prezidanto de EDF, Elektrokompomio de Francio) vizitis la konstru-ejon de Flamanville, ĉeeste de lokaj elektitoj kaj de la ĵurnalistoj, por oficialigi la ekon de la preparlaboroj pri la konstruado de la EPR¹.

Last-printempe, post 4-monata publika debato, la Komitato de EDF decidis daŭrigi la programon konstrui la unuan francan EPR-reaktoron ĉe la Flamanville-ejo, en la departemento Manche, sindevigante pri dialogo, travidebleco kaj partnereco kun la surlokaj agantoj. Malpli ol 6 monatoj post tiu decido, la programo disvolviĝas kiel planite.

Ĝis 2030, la energia bezono laŭverŝajne kreskos je 60%² en la mondo, kaj tiukadre granda parto de la eŭropa elektroproduktilaro devos esti renovigita. Por prepari la estonton, novaj investoj estas tial nepraj. Tiukontekste, EDF elektis apogi sin je la EPR-teknologio por prepari la renovigon de sia fisiejararo. Kiel ĉiuj atomcentraloj, Flamanville 3 produktos elektron sen ellasi CO₂ nek aliajn forcej-efikajn gasojn, tiel kontribuante al luktado kontraŭ klimata ŝanĝiĝo.

1 EPR = angla siglo = Eŭropa PremizataReaktoro [European Pressurized Reactor].
france = réacteur européen à eau pressurisée (REP)

2 Fonto: IEA Internacia Energio-Agentejo (Agence Internationale de l'Energie)

La EPR : elmontrado de industria farkapablo

La EPR estas reaktoro je premizata akvo, evoluigita ekde la komenco de la 1990 jaroj fare de EDF kaj AREVA-ANP, partnere kun la germanaj elektro-kompanioj. La EPR enkalkulas ĉiujn freŝdatajn progresojn rilate sekurecon, medi-protektadon, ekonomian kaj teknikan pintkapablojn.

La EPR: tre alta sekurec-nivelo

La EPR reaktoro ĝuas tre altan protekt-nivelon. Kvar savsistemoj kunestas: ĉiu el ili ebligas 100% de unu el la du nepraj sekurec-funkcioj, por protekti ĉia-cirkonstanco homon kaj medion: ĉesigo de la fisireakcio kaj malvarmigo de la reaktoro.

La EPR : plibonigitaj kapabloj

Heredanto de la francaj reaktoroj N4 (Chooz kaj Civaux) kaj de la germana KONVOI, la EPR apartenas al la kontinueco de ekzistantaj teknikoj. Ĝi plie ofertas pli grandan uzflekseblecon kaj malpli altan mastrum-koston. La EPR estos la plej potenca reaktoro en la mondo (1650 megavatoj kontraŭ 1450 por la plej lastaj). Ĝia vivdaŭro

estas planita je 60 jaroj, tio estas 20 jaroj pli ol la antaŭaj generacioj.

La EPR : plifortigita protekta-do de la medio

La EPR ebligas produkti energion sen enatmosferigi forcejefikajn gasojn.

La celoj de la konceptado kaj ekspluatado de EPR ebligas inter alie:

- pli efikan uzadon de la fisiaĵo (je konstanta elektro-produktado, malpliigo je 17% de la fisiaĵo-konsumado kompare kun la 1300 MW reaktoroj) ;

- malpliigon je 30% de la radio-aktivaj likvaj kaj gasaj ellasaĵoj, kompare kun la plej bonaj produktaĵoj de la franca fisiejararo (krom pri karbo 14 kaj tritio, por kiuj la kvantoj samas) ;

- produktadon de radio-aktivaj rubaĵoj malpli gravan je 30 %

La ekfunkciigo de la EPR programo estas planita en 2012. La koston de tiu investado oni taksas je 3,3 miliardoj da eŭroj.

tradukis Aleks Kadar

La grandaj etapoĵ de la projekto EPR

- duon-2006 : traktado de rajtigaj demandoj kaj ekigo de la publikaj enketoj
- dum 2007 : dekreto rajtiganta la kreon kaj konstruan permesilon.
- fine de 2007 - duon-2011 : konstruado de la konstruaĵoj
- duon-2009 - fine de 2011 : muntado de la materialoj / ekipaĵoj
- komence de 2012 : ŝargado kaj kuplado de la reaktoroj
- duon-2012 : funkciado de la unuavica EPR
- dum 2015 : decid-farado pri konstruado de EPRaroj en Francio

Flamanville 3 : les travaux préparatoires sont lancés

Le 10 octobre 2006, Pierre Gadonneix a réalisé une visite du chantier de Flamanville, en présence des élus locaux et de la presse afin d'acter le démarrage des travaux préparatoires à la construction de l'EPR.


Au printemps dernier, après 4 mois de débat public, le Conseil d'administration d'EDF décidait de poursuivre le projet de construction du premier réacteur EPR français sur le site de Flamanville, dans la Manche, en prenant des engagements de dialogue, de transparence et de partenariat avec les acteurs du territoire. Moins de six mois après cette décision, le projet se déroule comme prévu...

D'ici 2030, la demande énergétique devrait augmenter de 60%¹ dans le monde et dans ce cadre, une grande partie du parc électrique européen devra être renouvelée. Pour préparer l'avenir, de nouveaux investissements sont donc indispensables. Dans ce contexte, EDF a fait le choix de s'appuyer sur la technologie EPR pour préparer le renouvellement de son parc nucléaire. Comme toutes les centrales nucléaires, Flamanville 3 produira de l'électricité sans émettre de CO₂ ni d'autres gaz à effet de serre, contribuant ainsi à la lutte contre le changement climatique.

L'EPR : la démonstration d'un savoir-faire industriel

L'EPR est un réacteur à eau pressurisée développé depuis le début des années 1990 par EDF et AREVA-ANP en partenariat avec les électriciens allemands. L'EPR intègre tous les progrès récents en matière de sûreté, de protection de l'environnement, de performance technique et économique.

L'EPR : un très haut niveau de sûreté



© Photo Association des Ecologistes Pour le Nucléaire - www.ecolo.org

Le réacteur EPR est doté d'un niveau de protection très élevé. Quatre systèmes de sauvegarde co-existent assurant pour chacun d'eux 100% de l'une des deux fonctions de sûreté essentielles pour protéger l'homme et l'environnement en toutes circonstances : l'arrêt de la réaction nucléaire et le refroidissement du réacteur.

L'EPR : des performances améliorées

Héritier des réacteurs français N4 (Chooz et Civaux) et allemand KONVOI, l'EPR s'inscrit dans la continuité des techniques existantes. Il offre une plus grande souplesse d'utilisation et un coût d'exploitation moindre. L'EPR sera le réacteur le plus puissant au monde (1650 mégawatts contre 1450 pour les plus récents). Sa durée de vie est prévue pour 60 ans, soit 20 ans de plus que les générations précédentes.

L'EPR : une protection de l'environnement renforcée

L'EPR permettra de produire un énergie non émettrice de gaz à effet de serre. Les objectifs de conception et d'exploitation de l'EPR permettent notamment :

- une utilisation plus efficace du combustible (à production d'électricité constante, une diminution de 17 % de la consommation de combustible par rapport aux réacteurs de 1 300 MW) ;
- une réduction de 30% des rejets d'effluents radioactifs liquides et gazeux par rapport aux meilleures unités de production du parc nucléaire français (sauf pour le carbone 14 et le tritium pour lesquels les quantités sont équivalentes) ;
- une production de déchets radioactifs réduite de 30 %.

La mise en service du projet EPR est prévue pour 2012. Le coût de cet investissement est estimé à 3,3 milliards d'euros.

¹ Source AIE (Agence Internationale de l'Energie)

SuperNova met le feu !

Venu du Brésil, cela faisait un moment qu'on en parlait : Rogener Pavinski et DJ Roĝer sur un même album. Le groupe aurait pu s'appeler « **Les 2 Roger** ». Mais ils ont pris le nom de « **Super Nova**. »

Roger Borges (DJ Roĝer) est connu pour ses soirées discothèque et sa participation à la compilation électronique de Vinilkosmo (*Elektronika Kompilo 2004*). Il avait aussi sorti deux albums autoproduits. Bref on s'attendait plus à de l'électronique que du rock. Force est de constater que c'est du rock. C'est même l'un des rares albums 100% rock en espéranto.

Musique espéranto vivante et en direct

C'est à l'IS encore qu'il faudra aller pour le Nouvel An : Dolchamar (rock), la Pafklik (rap), Dj Roĝer (Techno), Jomo (rock'n'roll slave), Esperanto-Desperado (Folk), Kadakar (Rock), Projekto Marmelado (Folk) y sont attendus ! Du côté d'AS on aura au moins Dj Roĝer, il est partout celui-là !

Le premier clip jamais réalisé en espéranto : il est en bonus sur le disque...

La voix haut perchée de Roger Pavinski, renvoie au standard de la rock-pop actuelle. On ajoute des guitares envoûtantes de Ribeirão Preto et Alexandre Mancini de Campinas. Et Roger Borges ? Le seul qui ne se trouve pas au Brésil actuellement, puisqu'il officie à Madrid. DJ Roger s'occupe ici du synthé et de la batterie. Les sons électro placés par ce dernier complètent

Et les paroles ? L'un des intérêts d'acheter un CD en espéranto c'est que l'on peut enrichir son vocabulaire d'expressions nouvelles. Les thèmes abordés par nos rockeurs traversent



diverses influences de l'intimisme amoureux « *Pasio en Katen'* » à l'alter-mondialisme « *Alia mondo eblas* ».

Une supernova, d'après Wikipedia, c'est « une étoile qui devient très brutalement extrêmement brillante. La luminosité ne dure que quelques jours, et l'étoile reprend ensuite progressivement son éclat initial ». Dépêchez-vous d'acheter l'album, ou vous allez tout louper !

Platano

Bah, mais comment on achète ça ?

On fait un petit chèque que l'on envoie à l'association Espéranto-Jeunes
4 bis, rue de la Cerisaie,
75004 Paris

SuperNova est à 15,5 €

Les CD de Miĥaelo Provin et de Bronŝtejn sont à 15 €

Solvoj de la krucenigmoj de la lasta numero :

A : SILENTO - GE	1 : SATANO - UFE
B : ANILO - OKRO	2 : INO - RAMES
C : TOREADOROJ	3 : LIRO - AKISP
Ĉ : OK - EG	4 : ELEKTRISTE
D : TEDAĴOJ	5 : NOA - EE - TOR
E : ORAREEKO	6 : DUDEKA
F : AKI - ARU	7 : OOO - AK - JEN
G : UMISTAJ - OD	8 : KREĴOA - BT
Ĝ : FESTO - EBLE	9 : GROGO - ROLO
H : ESPERANTIO	10 : EOJ - JAŬDE

Nouvelles Sorties CD

La folk Russe très productive : déjà un doublet *Velura Sezono*, et *Revula Sezono* de Miĥail Povorin. Et encore un CD de Mikaelo Bronŝtejn *Printempo Blujinsa*.

Le concept est toujours le même : un homme, une guitare, des jeux de mots, des histoires...

Recenzo

«Les langues imaginaires. Mythes, utopies, fantasmés, chimères et fictions linguistiques»


Marina Yaguello, Paris, Seuil, 2006, 360 p.

Marina Yaguello, fama lingvistino kaj aŭtorino i.a. de *Alice au pays des langues* kaj *Le catalogue des idées reçues sur les langues*, pritraktas plurajn aspektojn de artefaritaj lingvoj. Fakte ŝi miksas malsamajojn kiel serĉaĵoj pri la *lingua adamica* (lingvo de Adamo, unika pralingvo de homoj laŭ la Biblio), projektoj pri universalaj lingvoj kaj fikciaj lingvoj de romanoj (ekz. en 1984 de George Orwell aŭ en *La majstro de la ringoj* de Tolkien).

Oni ekzemple lernas, ke la unua konata ekzemplo de artefarita lingvo estis la *lingua Ignota per simplicem hominem* de la abatino Hildegarde de Bingen (1098-1179). Fakte ne temis pri plena sistemo sed nur pri alfabeto de 23 literoj kaj vort-trezoro de ĉirkaŭ mil vortoj. Oni ne scias, ĉu tiu lingvo estis uzata por mistikaj aŭ kriptaj celoj. Oni ankaŭ ne scias, ĉu temis pri privata lingvo aŭ ĉu ĝi estis uzata de grupeto.

Inter fikciaj kaj pseŭdosciencaj verkoj, M. Yaguello pritraktas planlingvojn i.a. Esperanton kompreneble. La unuaĵo, kiun oni devas diri pri la aŭtorino estas ke ŝi tute ne estas esperantema. Ŝi tiel konsideras, ke planlingvaj verkistoj (ŝi nomas ĉiujn kreationojn de lingvoj (fikciajn aŭ verajn) *logophile* resp. lingvoŝatanto) havas dieman volon ĉar ili deziras «*anstataŭi Dion, Naturon kaj Kulturon*». Ŝi ankaŭ nomas ilin «*lingvaj frenezuloj*» kiel en la pasinta titolo *Les fous du langage*. *Des langues imaginaires et de leurs inventeurs* (1984) kies *Les langues imaginaires* estas nova kaj longigita versio.

Amuza ekstrakto estas la robotportreto de lingvo-kreanto : «*Sidanta en sia studejo tapetata de libroj, li akumulas, li amasigas, li komparas, li ordigas, li listigas, il plenigas slipojn. Li estas predo de noma deliro, taksinomia frenezo*». Ŝi priskribas tiun homon kiel «*solulo, plejofte, eĉ se li laboras por la bono de la homaro kaj prozelitas. Malfeliĉe, ĉiufoje kiam li eliras el sia studejo por alfronti*



la publikon, kontraŭ li staras konkuradoj, ĵaluzoj, kritikoj kaj klanluktoj, kiuj markas historion de la universala lingvo ».

Lingvoŝatanto, nelingvosciencisto, idealisto, la «*lingvofrenezulo*» laŭ M. Yaguello ofte devenas de centra Eŭropo, «*el iu lando dividita kaj ŝirita de la historio*». «*Ekleziulo, profesoro aŭ kuracisto, li estas skribĉambrulo, barbetulo kaj havas okulvitrojn ĉirkaŭbenditaj de metalo*». Ĉu ne perfekta portreto de L. L. Zamenhof ?

François Parchemin

L'inventeur de langue est un amateur, au double sens du terme ; amoureux des langues, il ne connaît souvent rien à la science du langage. Mais il y a avant tout chez lui une préoccupation de nature esthétique : le désir de produire un tout, une totalité, un ensemble clos mais exhaustif, doté d'une parfaite symétrie, dont les rouages baignent dans l'huile, où aucune discordance ou ambiguïté ne saurait s'introduire, d'où le gaspillage, l'équivoque, le malentendu sont bannis. Une construction agréable à l'œil et satisfaisante pour l'esprit car on n'y trouve pas ces regrettables exceptions, ces ratés, ces manques, ces fous qui constituent les tares des langues naturelles. (p. 45)

Extraits du livre

«*Regardez-le, le fou du langage, le logophile, l'inventeur de langues. Assis dans son cabinet de travail aux murs tapissés de livres, il accumule, il amoncelle, il compare, il classe, il dresse des listes, il remplit des fichiers. Il est la proie d'un délire dénominatoire, d'une folie taxinomique. Il lui faut reconnaître et classer les concepts, enfermer l'Univers tout entier dans un système de notation : énumérer, hiérarchiser, établir des paradigmes. Ambition folle ; mais il y a quelque chose de grandiose dans cette ambition-là, qui force l'admiration. Tant d'énergie déployée pour si peu de résultats. Je ne crois pas*

qu'autre chimère ait jamais été poursuivie avec autant d'ardeur par l'esprit humain, sauf peut-être la pierre philosophale ou la preuve de l'existence de Dieu, ni qu'une autre utopie ait fait couler autant d'encre, sauf peut-être le socialisme » (pp. 42-43)

«*Le logophile est aussi un homme seul, le plus souvent, bien qu'il travaille pour le bien de l'humanité et fasse du prosélytisme. Malheureusement, chaque fois qu'il sort de son cabinet de travail pour affronter le public, il se trouve en butte aux rivalités, aux jalousies, aux critiques, aux luttes de clans qui*




foto: Wikipedia

Ivan Illich

sklavo de sia teknologio

Dum pli kaj pli rapide kreskadas la homa produktado, ĝiaj efektoj super ni kaj nia medio estas pli kaj pli maltrankviligaj. Koscianta pri tio, multaj pledas por novaj formoj de energio kaj por pliraciigi ĝian uzadon. Sed malmultaj estas tiuj, kiuj konsideras la problemon pli profunda. Laŭ ili, ne temas ne pri malbona uzado de energio, sed pri troa kvanto de uzata energio.

Ivan Illich estis tia homo. Lia penso, originalega, interesiĝis pri diversegaj aspektoj de nia nuntempa socio. Sed la kerno de lia idearo estas, ke la industria socio pli kaj pli malliberigas la homaron anstataŭ liberigi ĝin. Kontraŭ ĝia freneza kaj senbara kreskego, li pledas por reiro al vole simpla vivmaniero.

La ĉi suba teksto estas parto de la Wikipedia artikolo pri Ivan Illich, enretigita pro ĉi tiu okazo. Ni verkis ĝin ĉerpante el la angla, franca kaj hispana versioj.

http://en.wikipedia.org/wiki/Ivan_Illich

Ivan Illich, naskita en Vieno la 4an septembro 1926 kaj mortinta en Bremeno la 2an de decembro 2002, estis kroata filozofiisto. Li aŭtoris diversajn kritikaĵojn pri la institucioj de la moderna kulturo, kaj traktis temojn, tiel diversajn kiel edukadon, medicinon, laboron, energion, ekonomian disvolviĝadon kaj genron.

Liaj tezoj trafis sian plej fortan famon dum la jardeko 70a, sed nuntempe estas malvaste konataj.

Vivo

Li naskiĝis en Vieno, en kroata jud-katolika familio, kiu forfuĝis en 1941 al Italio pro la kontraŭjudaj leĝoj. Unue studinte histologion kaj kristalografion en 1941 en Florenco, li ekstudis teologion kaj filozofion la postan jaron en la vatikana universitato. Li verkis disertacion pri la historiisto Arnold J. Toynbee.

En 1951, oni sendis lin pro lia peto al Novjorko por pastri portorikanan parokon. En

1956, oni nomumis lin vicdekano de Katolika Universitato de Portoriko. Tie, Ivan Illich renkontis Everett W. Reimer, kaj ambaŭ ekanalizis sian propran funkcion de « edukistestroj ». In 1961, Illich fondis Interkulturan Centron de Dokumentado (CIDOC, Centro Intercultural de Documentación) en Kvernavako (Cuernavaca) en Meksiko, por instruadi lingvojn al nordamerikaj misiistoj. Tamen, li celis ja kontraŭi la partoprenon de Vatikano al la moderna disvolvigado de la laŭnome Tria Mondo. Pro siaj starpunktoj,

« Les langues imaginaires » : extraits

➔ marquent l'histoire de la langue universelle : « Presque toujours méconnus, ils se sont heurtés au scepticisme et à l'obscurantisme, quand ce n'était pas à la raillerie », écrit Marcel Monnerot-Dumaine¹, lui-même adepte et historien de la langue universelle.

L'inventeur de langue est un amateur, au double sens du terme ; amoureux des langues, il ne connaît souvent rien

à la science du langage². Mais il y a avant tout chez lui une préoccupation de nature esthétique : le désir de produire un tout, une totalité, un ensemble clos mais exhaustif, doté d'une parfaite symétrie, dont les rouages baignent dans l'huile, où aucune discordance ou ambiguïté ne saurait s'introduire, d'où le gaspillage, l'équivoque, le malentendu sont bannis. Une construction agréable à l'œil et satisfaisante pour l'esprit car on

n'y trouve pas ces regrettables exceptions, ces ratés, ces manques, ces flous qui constituent les tares des langues naturelles.

C'est un idéaliste : s'il crée une langue philosophique, c'est pour réconcilier le langage et la pensée ; s'il crée une langue internationale de communication, c'est pour réconcilier les hommes. C'est fréquemment un homme originaire d'Europe centrale, issu d'un pays divisé et déchiré par l'histoire : beaucoup d'inventeurs au tournant du XX^e siècle proviennent de l'Empire russe ou de l'Empire austro-

¹ M. Monnerot-Dumaine, *Précis d'interlinguistique générale et spéciale*, Paris, 1960.

² Peu de linguistes qualifiés se sont intéressés à la question. Au XX^e siècle, on peut citer Sapir, Jespersen et Martinet.

CIDOC oponiĝis al la katolikaj ekleziestroj. Fine de la jardeko 60a, Ivan Illich forlasis sian pastrecon. CIDOC malfondiĝis en 1976, laŭ interkonsento de siaj membroj kiuj siaflanke daŭrigis sian agadon.

Dum la jardeko 80a Illich multe vojaĝadis, dividante sian tempon inter Usono, Meksiko kaj Germanio. Li profesoris en la universitatoj de Penn State kaj Bremen.

Dum siaj lastaj jaroj li suferis pro kancera kreskaĵo ĉe la vizaĝo, kiun li rifuzis operaciigi pro sia kritiko de profesia medicino, kaj pro la fakto ke tio verŝajne perdis al li la kapablon paroli. Li ankaŭ rifuzis uzi sedativojn, kiuj forprenus lian klarpenson. Li sensukcese provis kuraci ĝin per tradiciaj metodoj, kaj okaze fumadis opion por elteni la doloron.

Industria vivmodo kontraŭ kunvivemo

Li batalis kontraŭ la aŭta sistemo, kaj ĉiuj veturiloj tro rapidaj, kiujn li juĝis malliberigaj kaj iluziaj. Ekzemple, li kalkulis ke, konsiderante la mezuman tempon necesan por perlabori aŭton, teni ĝin bonstata kaj fine veturadi per ĝi, ĝi rapidas ses kilometrojn hore. Li ankaŭ kritikis la kuracsystemon kaj la eduksystemon, kiujn li konsideris ne-kunvivemaj.

Li elpensis la koncepton de radikala monopolo : kiam teknika rimedo estas aŭ ŝajnas tro efika, ĝi baras la vojon al pli malrapidaj rimedoj (ekzemplas la aŭtoŝoseo rilate al piedirado, aŭ la poŝtelefono rilate al hejmtelfono). Kun lia amiko, la filozofiisto Jacques Ellul, oni rajta konsideri lin unu el la ĉefaj inspirintoj de la ideoj de « malkreskado » kaj « volata simpleco ».

La ĉefa Illich-a koncepto estas tiu de kontraŭ-produktiveco, kiu evidentigas ĝenan fenomeno: kiam ili atingis ian kritikan sojlon (kaj estas monopolaj), la grandaj institucioj de la modernaj industriaj socioj obstaklas al siaj propraj celoj : la medicino malutilas al la sano (kuracante malsanojn, kiun ofte kaŭzis la industria sistemo kiu progresigas ĝin), la veturrimedoj (kiuj sume perdigas tempon), la lernejo (kiuj brutigas), la komunikadoj (kiuj tiel densiĝas ke ili perdas valoron), ktp...

Alia koncepto, centra en la ideo de Ivan Illich, estas tiu de kunvivado. Kontraŭ la superprogresintaj teknikaj rimedoj, Illich metas la kunvivemajn ilojn. Li difinas kunviveman ilon kiel simplan. Ĝi funkcias per ies forto (ne anstataŭ ĝi), kaj ĉiu ajn povas uzi ĝin sen postulata scio aŭ sen interveno de specialisto.

Laŭ Illich, la industria socio nepre ne povos disvolviĝi sen fino.

Ĝi neeviteble trafos krizan limon, kiu postulos radikalan ŝanĝigon aŭ plenan memdetruon . Sed kia estos tiu necesa rompo (kiun li nomas « politika inverŝo »), ĉu katastrofeca, ĉu revolucia aŭ ĉu riformema li ne klare precizigas. Illich kredas ke la postindustria socio, kiu sekvas tiun rompon, devos esti kunvivema, tio signifas reveni al pli simplaj teknikaj rimedoj pli taŭgaj por homa kunvivado.

Socio sen lernejoj

Alia grava flanko de la penso de Illich estas lia kritiko de la moderna eduksistemo, kiun li detaligas en sia plej konata verko « *Senlernejigi la socion* » (1971). Kvankam la libro hodiaŭ povas aspekti iom eksmoda, ĉar ĝi referencas pri tiamaj edukprogramoj, ĝiaj asertoj kaj bazaj proponoj konservas sian radikalecon. Illich organale prezentas la instituciojn – en ĉi tiu kazo, la lernejoj – kiel iloj, kiuj tiel disvolviĝis ke ili fariĝis kontraŭproduktivaj. Celante klerigi la homojn, la eduksistemo fakte produktas homojn misedukitajn, nesufiĉe penskapablajn, kaj obeemajn.

Kontraŭ la institucia edukado, li proponas krei eduk-retojn tra kiuj ĉiu lernanto rilatadas kun spertuloj, en ĉia momento de sia vivo, kaj konstruadas mem sian propran konon. Lia propono uzi modernan teknikon por tiuj eduk-retoj estas aparte rimarkinda : multaj el la priskribitaj trajtoj de tiu eduk-reto kongruas kun la uzado de Interreto ĝenerele, kaj aparte kun la ideojn de Vikipedio.

Christophe Chazarein

hongrois. C'est le plus souvent un ecclésiastique, un professeur ou un médecin, c'est-à-dire justement un homme de cabinet, un homme à barbiche et à lunettes cerclées de métal, comme le relève la galerie de portraits qui orne le livre de Monnerot-Dumaine, une des deux « bibles » de l'interlinguistique³ » pp. 45-46

3 L' « interlinguistique » est la science des langues artificielles, ou plutôt, « langues auxiliaires construites ». L'autre « bible » est la monumentale *Histoire de la langue universelle* de Louis Couturat et Léopold Léau (Paris, 1903).

« Au plan de la pratique langagière, enfin, on constate que l'espéranto, la seule des langues construites ayant eu (et ayant encore) un nombre non négligeable de locuteurs, a lui-même tendance à se diviser spontanément en dialectes sur le terrain, ce qui est en définitive une preuve de son dynamisme et de sa viabilité puisque les langues, pour vivre, sont vouées à changer et à se fragmenter. (Notons cependant que Zamenhof aurait souhaité une langue fixée à jamais) » p. 230.

François Parchemin

VOUS AVEZ VU
LA MODE HIVER
2006-2007?



JEFO-estraro / bureau d'Espéranto-Jeunes

Prezidanto: François Parchemin	Chemin du Font du Broc, Quartier Ste Roseline 83460 les Arcs	tél. : +33 6 77 12 56 61 francois.parchemin@esperanto-jeunes
Vic-prezidanto: Mélaïne Desnos	50, rue du Docteur Léonce Basset 93400 Saint-Ouen	tél. : +33 1 40 11 31 87 melaine@esperanto-jeunes.org
Sekretario: Axel Rousseau	26, rue Boussingault 75013 Paris	tél. : +33 6 63 70 11 32 axel@esperanto-jeunes.org
Vic-sekretario: Fabien Tschudy	6 rue des Cavaliers 68700 Aspach le Haut	tél. : +33 6 87 20 67 31 fabien.tschudy@esperanto-jeunes.org
Kasistino: Julia Hédoux	2, avenue du Bois, les Estudiales - appt 76 95000 Cergy	tél. : +33 6 17 06 80 70 julia@esperanto-jeunes.org

JEFO-komitato / conseil d'administration

Aleks Kadar	13, avenue de Wagram 75017 Paris	tél. : +33 6 86 58 00 20 aleks@esperanto-jeunes.org
Alexandre Poulet	9, rue Camille Saint-Saëns 95480 Pierrelaye	tél. : +33 1 34 21 99 84
Benoît Fonty	10, rue Bonne Louise 44000 Nantes	tél. : +33 2 40 69 48 95 benoit@esperanto-jeunes.org
Christophe Chazarein	200, rue Ursule Devals 82000 Montauban	tél. : +33 6 84 44 20 18 christophe@esperanto-jeunes.org
Cyrille Poulet	103, av. Verdier 92120 Montrouge	tél. : +33 6 77 28 13 25 cyrille@esperanto-jeunes.org
Isabelle Clopeau	6 rue J.P. Calloch 22000 Saint-Brieuc	tél. : +33 2 96 94 09 75 isabelle.clopeau@esperanto-jeunes.org
Louise Sauvé	La Jennetierre 41100 Marcilly-en-Beauce	tél. +33 6 32 47 58 53 houbala@orange.fr
Olivier Dupré	26, rue Boussingault 75013 Paris	tél. : +33 6 61 89 66 81 olivier.dupre@esperanto-jeunes.org
Olivier Faurax	1 rue Jean Jaurès 13120 Gardanne	ofaurax@laposte.net
Pascal Leclaircie	10, rue Jean-Jaurès 91300 Massy	tél. : +33 6 66 28 02 30 pascal@esperanto-jeunes.org
Sébastien Montagne	6, résidence Pasteur, 21 rue des Ormeaux 49100 Angers	tél. : +33 2 41 41 08 23 sebastien@esperanto-jeunes.org
Thibaud Clouet	20, rue Barbanègre 75019 Paris	tél. : +33 6 77 11 09 24 thibaudclouet@yahoo.fr
Véronique Bichon	8 rue Chevreuil 34310 Capestang	tél. : +33 6 63 14 56 77 veronique.bichon@esperanto-jeunes.org
Vincent Pacheu	Vallon de la Tour de Keyrié 13100 Saint-Marc-Jaumegarde	tél. : +33 6 81 71 40 55 vincent.pacheu@esperanto-jeunes.org

IL FAUDRAIT ÊTRE
GIVRÉ POUR NE
PAS L'ACHETER !



Esperanto, oficiala lingvo de Antarkto

Si vous avez aimé «*La marche de l'empereur*», ne manquez pas les t-shirts **Eŝperanto-Jeunes**.

Élaborés en collaboration avec le laboratoire de recherche Paul-Émile Victor, ils sont capables de résister aux températures extrêmes des rencontres torrides de Festo ou d'IJS, comme au vent glacial qui souffle lors des réveillons les plus froids du fin fond de l'Allemagne lors de l'Internacia Semajno (n'oubliez pas une petite laine quand même).

Avec ce t-shirt, vous serez sûr d'attirer la convoitise de votre entourage et de faire renaître la flamme dans l'œil de l'être aimé.

Modèles et tailles disponibles

Femme : tailles S - M - L
Homme : tailles S - M - L - XL - XXL

J'en veux ~~un~~ ! plusieurs !

Le t-shirt est au prix de **8 €** l'unité, auquel s'ajoutent les frais d'envoi.

Pour les groupes, nous vous offrons 2 t-shirts pour 6 t-shirts achetés.

Soit un prix de :

Quantité	Tarif ⁽¹⁾	Tarif + port ⁽²⁾
1	8,00 €	10,00 €
2	16,00 €	19,20 €
3	24,00 €	28,80 €
8	48,00 €	52,80 €

(6 + 2 gratuits)

(1) : si achat au siège de l'association

(2) : si achat par correspondance (frais de port inclus : 20% de frais de port jusqu'à 40 € d'achat et 10% au-delà.)

Pour commander

envoyez votre chèque à l'ordre
d' **Eŝperanto-Jeunes** à l'adresse suivante :

Eŝperanto-Jeunes
4bis, rue de la Cerisaie
FR-75004 Paris

Disponibilité et commande sur Internet :

<http://esperanto-jeunes.org/tshirt>



